



Kulturaj Kajeroj

E MAHE

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, EPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Té! 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 5 fkoj Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Bonfara : 10 fkoj Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO - APRILO

1964

2

KULTURAJ KAJEROJ

1964

Marto - Aprilo

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

EN H A V O

La ĵargonigo de la lingvoj (P. Babin).

Esperanto tra la mondo.

Romanika arto en Saintonge.

Kiam Shakespeare vivis.

Iom da scienco : La lasero.

Apud Gresillon : La Ruĝa Teraltaĵo (B. Cheverry).

Gravaj datrevenoj.

Malhonestulo kaj poeto : F. Villon.

La balado de la pendumitoj (tr. J.-L. Tortel).

Por via distro - Nia konkurso.

Gramatiko per bonhumoro.

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeraj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « Kulturaj Kajeraj » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

LA JARGONIGO DE LA LINGVOJ



En 1962, en la tria numero de nia revuo, mi skribis artikolon pri tiu jargono franca-hispana parolata en Sud-Ameriko. Mi nomis ĝin « franc-pana ». Tiaj ekzemploj de intermiksado de lingvoj estas sufiĉe kutimaj ĉefe kiam temas pri ne multe disvastigitaj lingvoj. Sed la problemo estas pli grava, pli atentinda, eĉ pli maltrankviliga, kiam temas pri lingvoj parolataj de multaj homoj en la mondo.

Antaŭ kelkaj semajnoj aperis en Francio libron verkita de lingvisto, Pro. Etiemble. La titolo mem de la libro estas sufiĉe pensodona : « Parlez-vous franglais ? » (Ĉu vi parolas la franglan lingvon ?). Kiel prezentadon de sia verko, Pro. Etiemble citas kelkajn liniojn el libro de Senac de Meilhan, kiuj konsistigas veran pledon favoran al internacia neŭtrala lingvo : « Lingvo ne povas superregi sen tio ke la ideoj de ĝi transdonitaj imponas al la spirito, kaj nacio kiu parolas alian lingvon ol sian iom post iom perdas sian karakteron. »

La tuta libro de Pro. Etiemble temas pri la « anglo-manio » de kategorio de Francoj, kaj la unua ĉapitro titoliĝas « Malgajiga rakonto ». La vortaro estas miksaĵo de francaj kaj anglaj vortoj kaj la rezulto estus komika se ni ne pensus, ke tia estas la « franca » lingvo uzata en gazetoj, revuoj, noveloj. En alia ĉapitro titolita « Resumita provizora gramatiko de la atlantika jargonaĵo », Pro. Etiemble, baziĝanta sur ekzemploj ĉerpitaj el franclingvaj skriboj, provas starigi la regulojn de tiu lingvaĉo. Ĉar lingvaĉo ne estas troiga vorto. Ni nur legu leteron senditan de iu Anglo al multe

legata franca revuo : « Ĉu mi rajtas peti ke la Francoj parolu france ? La prononco de la anglaj vortoj uzataj en Francio estas nekomprenebla de Anglo... » ; kaj ni konstatas ke la Francoj uzas « anglajn » vortojn tute nekonatajn de la Angloj.

Ne nur la franca lingvo estas koncernita. En la lasta parto de sia verko Pro. Etiemble citas artikolojn aŭ elтираjojn el libroj, kiuj protestas kontraŭ « la italigo de la franca lingvo », « la francigo de la hispana lingvo », « la francigo de la angla lingvo », la angligo de la kanad-franca lingvo ».

Ĉu ni ne povus ĝoji pri tiu reciproka alproksimiĝo de la diverslingvaj popoloj pere de tiu interpenetrado de la lingvoj ? Ne, ĉar la naciaj lingvoj devas resti kulturaj lingvoj kaj ni povas timi, ke venos la tempo kiam la Francoj, la Angloj, ne plu komprenos siajn grandajn verkistojn sed nur la detektiv-romanojn. Kaj en tiu fenomeno kuŝas alia danĝero. Ni malkovras ĝin en alia citaĵo de Pro. Etiemble el militista revuo franca : « Ne diru : unue pensu same, kaj vi poste trovos komunan esprimmanieron. Ne, trovu komunan esprimmanieron kaj baldaŭ vi pensos same ». Leginte tion, nur relegu la prezentparolojn de Senac de Meilhan kaj vi komprenos la danĝeron.

Kiam la defendantoj de la pureco de la naciaj lingvoj trovos solvon ? Ŝajnas al ni, ke tiu solvo ekzistas. Sed Esperanto havas grandan malperfektaĵon : ili mem ne elpensis ĝin !

P. BABIN.



LA PAŝTITO PACIENCE ATENDAS
SIAN EKZEMPLERON DE

Kulturaj Kajeroj

Sendu vian abonon al via landa peranto aŭ al
MICARD, « Kulturaj Kajeroj »
Epineux-le-Séguin (Mayenne) — p.ĉ.k. Nantes 2349-62

Esperanto tra la Mondo



Esperantaj manifestacioj

— Internaciaj FERIAJ kursoj en Helsingör, Danujo : 19-26 - 7. Adreso : S-ro L. Friis, Inge-mannsvej 9, Abyhøj, Danujo.

— Geografia Semajno en Groningen (Nederlando) : 25-7 - 1-8. Adreso : S-ro N.C. Kuiterman v. Goor, Johan de Wittstr. 103, Groningen.

kaj se vi ne iros en Tokio...

— Eŭropa Esperanto-konferenco « Esperanto en a praktikon » 18-24 - 7 1965 en Vieno. Adreso : Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16, Wien XV (Aŭstrio).

El Hispanio

— Estas ĵus inaŭgurita la unua konstanta universitata katedro de la Internacia Lingvo Esperanto sur la teritorio de Hispanio, en la Universitato de La Laguna. Jam en pluraj diverslandaj universitatoj Esperanto troviĝas en la instruprogramo : Liverpool, Amsterdam kaj Zagreb.

El Hindujo

— La unuan fojon aperis libro pri la Internacia Lingvo en unu el la indiĝenaj lingvoj de Hindujo : la bengala. Temas pri enkonduka historia verko « Esperanto-andolon » (la Esperantomovado).

El Vjetnamio

— Krom la oficiala ilustrita revuo « Vjetnamio antaŭenmarŝas », estis en la jaro 1963 eldonitaj kvar novaj verkoj en Esperanto « Senelirejo » (romano), « La aventuroj de Ze Men » (fantazia rakonto), « Elektitaj poemoj », kaj « La lasta fortreso » (romano).

El Nov-Zelando

— La plej ŝatata nov-zelanda revuo por geknaboj « Junior Digest » presigas ĉiumonate esperanto-kurseton kun aventuroj per esperanto kaj simpla gramatiko. Se la knaboj tion deziras, sonbendo kun prononca parto povas esti sendata al la instruistoj.

Informado al kencilianoj

— Ĉiuj episkopoj kunvenintaj en Romo okaze de la koncilio ricevis latinlingvan informan leteron pri la internacia lingvo. Krome, pluraj religiaj eminentuloj ricevis ekzempleron de la papa encikliko « Pacem in terris » en esperanto.

Franca nacia kongreso

— Krom S-ro Christian Fouchet, ministro pri nacia edukado, alia franca ministro : S-ro André Malraux, eniris la patronan komitaton.

La Universala Kongreso

- La temoj de la du laborsekcioj estos :
- La eduka valoro de la instruado de la internacia lingvo en la lernejoj ;
- Aplikado de modernaj metodoj en la informado pri esperanto.

El Danlando

— S-ro Simo Milojevic, el Beograd, prelegis en danaj lernejoj 20 foje pri Nepalo (kie li instruis Esperanton) kaj 8 foje pri Jugoslavio. La prelegojn en esperanto kun traduko aŭskultis 1 200 gelernantoj kaj 400 plenaĝuloj.

El Hungario

— Ministroprezidanto Kadar akceptis, post la kongreso en Sofio, la gvidantojn de Hungara Esperanto-Asocio, kiuj donacis al li la libron « Dia Komedio » de Dante.

— La ministerio por popolklerigo publikigis permeson por nedeviga instruado de la internacia lingvo en ĝeneralaj kaj mezaj lernejoj.

El Suda Koreujo

— Post prelegoj kaj ekspozicioj, reviviĝas la agado por esperanto. Oni jam instruas la lingvon en tri lernejoj. Por liveri korespondantojn kaj ekspozician materialon, skribu al : Domo de Esperanto, 104-43 An Am-dong, Seoul.

Ekspozicioj

— En Camaguey (Kubo) okazis la unua esperanto-ekspozicio de post la revolucio.

— Ampleksan ekspozicion aranĝis Mozambika Esperanto-Asocio.

— Antaŭ kelkaj monatoj okazis ekspozicio en Pekino.

Frazaro Esperanto-Japana

— Se vi iros al la Universala kongreso en Tokio en 1965 aŭ al la Olimpikoj de 1964, sciuj ke niaj japanaj amikoj eldonis frazareton esperantan-japanan. La japana teksto estas presita per esperanto-literoj.

Esperantlingvaj radioelsendoj

— En 1963, estis entute 1 701 esperantaj radioelsendoj kompare kun 1 677 en 1962 kaj 1 485 en 1961. 20 stacioj en 13 landoj dissendis..

Gejunuloj :

Ĉu vi aliĝis al la Kongreso de Tejo ? Amsterdamo (8-15 - 8) — Riĉa programo en agrabla regiono.

Informantino por Francujo : M. T. Boiton, 21, avenue Sadi-Carnot, Grange-les-Valence (Ardèche).


Romanika Arto en...

SAINTONGE

Saintonge (Santonio), kiu situas meze de la Atlantika marbordo ĉirkaŭ la urbo Saintes, estas unu el la plej malgrandaj francaj provincoj sed ĝia famo de longe transiris la limojn dank'al ĝiaj produktaĵoj el kiuj la plej konata estas la konjaĥo. Sed ĝi estas konata en tuta Francio ankaŭ pro ĝiaj romanikaj preĝejoj. Ili estas pli ol kvin cent. Ne ĉiuj estas « granduloj » sed ĉiuj estas vizitindaj pro arkitekturaj partoj aŭ detaloj. La plej granda nombro el ili estis konstruitaj ĉirkaŭ la XII-a jarcento. Ili formas sur malgranda spaco ne nur kolekton de unikaj artaĵoj sed ankaŭ senegalan turisman kuriozaĵon.

La juveloj de tiu ornamaĵo de longe mirigis la artistojn kaj arkeologojn, kiuj vizitis la regionon. El iliaj verkoj ni eltiras la du jenajn frazojn : « En neniuj regionoj la romanika arto estas pli loga ol en Saintonge », kaj « la brodaĵoj per kiuj la tiuregionaj skulptistoj kovris la arkaĵojn estas nekompareblaj ». Ni do povas diri, ke Santonio havas siajn preĝejojn, kiel la Loire-valo havas siajn kastelojn.

La romanika arto, rememoro de la romia arkitekturo, aperis en Francio post la barbaraj invadoj ĉefe dum la XI-a kaj la XII-a jarcentoj. Ĝi karakteriziĝas per la preskaŭ ekskluziva uzado de la duon-cirklo, de la plenarko, per kiu la mezepokaj artistoj faris mirindaĵojn. La ornamo, komence senreliefa, pli kaj pli malkrudigis kaj riĉigis per alportadoj el Hispanio kaj el Oriento. La plej granda parto el la kapiteloj kovriĝis per pentraĵoj kaj la preĝejoj fariĝis « la libro per kiu la popolo instruiĝis ».



AULNAY. — Preĝejo preskaŭ sendifekta, unu el la plej perfektaj en Francio, pro la multeco de la subjektoj kaj la kvalito de la realigo.

Dum la XI-a kaj la XII-a jarcentoj, ĉie konstruiĝis preĝejoj. Oni malkonstruis malnovajn preĝejojn por konstrui novajn pli grandajn, febro kaptis la homojn. Pli ol du mil preĝejoj kaj kapeloj elŝprucis el la tero. La plej multo ne plu ekzistas sed en kelkaj partoj de la provinco oni renkontas tiajn konstruaĵojn en la plej malgrandaj vilaĝoj, ĉiun duan aŭ trian kilometron. Sed kial flo-

radis tiom da religiaj artaĵoj en tiu loko? Ĉar la klaraj, precizaj reguloj de la romanika arto plaĉis al la temperamento de la Santanoj, la tieaj loĝantoj, kiuj, tra la jarcentoj, transdonis de generacio al generacio la grandan lertecon de tiuj, kiuj jam kovris la regionon per civilaj kaj militaj konstruaĵoj sub la romia regado. Alia kaŭzo estas la tiama kvieteco de tiu lando kaj la kuraĝigoj de la dukoj de Akvitanio. Plie, la tiea ŝtono estas altkvalita.

Plejparte, la nunaj preĝejoj estas rekonstruaĵoj. Ofte okazas ke sub ili oni trovas prahistoriajn tombojn, antikvajn ruinaĵojn aŭ subteraĵojn. Simplaj ligno-kapeloj ĉe la komenco, poste rektangulaj konstruaĵoj kun ĉarpentaĵo, krucoformaj, preskaŭ ĉiuj estis « orientitaj ». Dum la XII-a kaj la XIII-a jarcentoj, la limigitaj kurboj estis anstataŭitaj de la sveltaj linioj de la ogiva stilo. Ĉu estas eble ne halti antaŭ tiuj orkoloraj aŭ perlgrizaj malnovaj fasadoj, antaŭ tiuj jareluzitaj skulptaĵoj montrantaj historiajn memoraĵojn aŭ lokajn legendojn, antaŭ la rakonto de la ĝojoj kaj suferoj de niaj prapatroj.



FENIUX. — La preĝejo staras, preskaŭ soleca en arbar-kovrita regiono. Ĝi estas nomita « perlo de Santonio » pro la gracio de sia sonorilejo kaj la riĉeco de sia fasado.

Pluraj el tiuj preĝejoj estas ĉiujare multe vizitataj ĉar ili staras proksime de la grandaj vojoj. Sed multaj aliaj, kiuj sin kaŝas sur vojetoj, en vilaĝetoj, estas vizitindaj. Ili meritas, ke la turisto iom longigu sian rondiradon ĉar ili havas la okazon riĉigi per ilia kontemplado. Nia Santonio estas bela libro, kiun oni sciu foliumi.

(Verkita laŭ la libroj de Charles Connoué
« Les Eglises de Saintonge »)

Mondes perdus et religions disparues



PERDITAJ MONDOJ

Sub tiuj trajtoj antaŭ 1000 jaroj, la dio Turms aperis al la Etruskoj. Tiu dio kondukis la animoj al la Inferoj. Tiu kapo el kvirita argilo ornamis la tegmenton de templo en Veies.

Neniu kulisoj; neniu funda kurteno; sed tre simplaj akcesoraĵoj: tabloj, seĝoj, arbetoj, ktp por simboli la lokon, kie la sceno okazis. Tiu loko estis kelkafoje montrita nur

de vorto skribita sur tabuleto. Plej ofte uzata estis la antaŭa scenejo, ĉar plej multe el la tiutempaj teatro-verkistoj lokis siajn scenojn en nedifinitaj spacoj : strato, placo, iu ĉambro. La malantaŭa scenejo utilis por pli precizaj lokoj. Tiu aranĝo venis de la Mezepoko, kies teatroj havis neprecizan lokon (plataea) kaj precizajn lokojn (sedes, domus, loca). Nur en la XVII-a jarcento evoluis la teatro : la kurteno pli kaj pli alproksimiĝis al la fronta parto de la antaŭa scenejo kaj la dekoraj fariĝis pli nombraj kaj komplikaj.

Sur tiu tute nuda scenejo la personeco de la aktoro duoble gravis. Lia kostumo aspektis des pli riĉa ke malriĉa estis la dekorato. La atento de la rigardantoj koncentriĝis sur liaj gestoj kaj mienoj. Plej grava estis lia deklamado. Pro tio la arto de la komediisto estis zorge ellaborita. En tiu tempo la famo de la anglaj aktoroj transiris ĝis la kontinento. Junaj aktoroj rolis kiel virinoj. Kvankam la komediistoj vivis preskaŭ flanke de la socio, ili estis ne nur popularaj sed ili ofte havis honorigajn amikojn. Kiuj posedis almenaŭ parton de la teatro, kie ili ludis, tiuj estis multe pli riĉaj ol la malsategantaj aŭtoroj, kiuj provis vendi siajn manuskriptojn.

La teatro-trupoj pli kaj pli gravis kaj ĉe

la surtroniĝo de James la unua la trupo de Shakespeare fariĝis reĝa trupo. De ĝia kreado tiu trupo ludis en diversajn gastejoj kaj teatroj kaj en 1599 konstruigis sian propran teatron (Blackfriars) tute tegmentita, kie ĝi povis ludi eĉ dum la vintro.

La furoro por teatro alfluigis la monon de la publiko kaj, konsekvence, la spekulantojn. Iu Philip Henslowe, bopatro de la fama tiama aktoro Edward Alleyn, estis finegocanto kaj lombardisto. Tiu sagaca kapitalisto, kvankam analfabeto, aĉetis la teatraĵojn de la aŭtoroj kaj vendis ilin al la aktoroj. Li pruntedonis monon al la bezonaj verkistoj kaj ankaŭ vendis teatro-akcesoraĵojn. Li konstruigis plurajn teatrojn kaj fakte disponis pri du aŭ tri trupoj.

Tia estis la situacio de la teatro, kiam la nomo Shakespeare komence diskonigiĝis. Pli kaj pli artigiĝis la stilo, la temoj kaj la prezentado de la teatraĵoj sub la influo de la altaj protektantoj, membroj de la reĝa familio ; sed, eĉ verkitaj intence al la pli kaj pli kulturitaj teatro-amantoj, la teatro restis populara kaj la samaj trupoj prezentis la samajn teatraĵojn antaŭ la nobeluloj kaj antaŭ la popola publiko.

P. BABIN.

EL LA NASKIGLANDO DE LA KREINTO DE ESPERANTO !

La Faraono de Prus (3 Volumoj).

Quo Vadis de Sienkiewicz.

Medalionoj de Nalkowska.

Supera kurso de Esperanto de Dreher (nur esp.)

Koloroj de Baghy.

Nigra kokino (libreto por infanoj).

kaj aliaj valoraj eldonaĵoj
aĉeteblaj ĉe nia Libro-Servo

S-ino ROUX

29, rue de la Croix-Verte

SAUMUR (Francio)

LA LASERO

(anglalingve : laser = light amplification by stimulated emission of radiation (pligrandigo de la lumo per ekscitita emisio de radiado)).

Vi certe konstatis, ke sur via radioaparato la nombro de la longondaj stacioj estas tre malgranda sed ke la nombro de la mallongondaj stacioj estas multe pli granda. Tio signifas, ke la kvanto de la sendeblaj informoj estas inverse proporcia al la ond-

longo. Pro tio dum dekoj da jaroj oni provis malkovri pli kaj pli mallongajn ondojn dum la nombro de la inform-elsendoj pligrandigis.


Jam la fluoreska tubo generis ondojn multe pli malgrandajn ol la radio-ondoj. Sed ili ne estis uzablaj pro tio, ke la lumo de la fluoreska tubo estas nekohera, tio signifas, ke la ondoj de tia lumo ne cirkulas laŭ tute regulaj sekvencoj, kiel marondoj. La radio-ondoj estas koheraj.

La lasero estas tre grava malkovro ĉar ĝi permesas la emision de tre mallongaj ondoj ; radaroj, televido, radio uzas ondojn metrajn, hektometrajn aŭ kilometrajn ; la elektronistoj fabrikas ondojn decimetrajn aŭ centimetrajn ; la ondlongo de la lumaj radiadoj emisiitaj de lasero estas malpli ol unu mikrono. Sur unu laser-radio estos eble elsendi samtempe 160 televido-programojn !

Sed kio estas la lasero ? Oni komence utiligis la rubenon (aluminian oksidon) kun kromo, kiel « apogilo ». Kiam atomo estas submetita je ekscitado, elektrono de la periferia tavolo estas sendita al pli malproksima orbito, sed emas reveni al orbito pli proksima de la nukleo. Per tiuj « refaloj » la atomoj emias radiojn, kies ondlongoj dependas de la nivelo-diferenco inter la du orbitoj. En la ruben-lasero la atomo estis « pumpita » de flaŝ-lampo al nivelo ĝenerale tre alta, kaj poste refaligita. Oni tiamaniere okazigis emision de impulso de ruĝa lumo laŭ la direkto de la akso. Utiligante la teknikon de la fluoreska-tubo oni baldaŭ uzis la gas-laseron, tubon en kiu la aktiva maso (raraj gasoj) estas enfermita. Sed la ekscitado de la atomoj estas perioda dank'al elektroj rilatigitaj al oscila cirkvito.

Ĉar la laser-ondo estas samnatura, kiel la herca, ĝi povas esti uzata por la elsendado de informoj kun la granda avantaĝo, ke per laser-radio oni povas samtempe sendi multegon da informoj. Oni povas imagi satelitojn, kiel relajsojn de la interkontinentaj mesaĝoj transsenditaj per malgranda nombro de lumaj radioj. Sed multaj problemoj restas ankoraŭ solvotaj.

Jam sur kelkaj kampoj la laser-radio estas uzata. Proksime de la fonto la koncentrado de la lasero estas ege granda, kaj la lum-fasketo tiel maldikega, ke oni uzis ĝin por luti metalfadenojn unu dekonon da milimetro diametrajn. Pro tio eĉ la lasero estas ankaŭ mirinda kirurgo-instrumento. Per ĝi oni jam operaciis bestojn kaj eltranĉis kun grandega precizeco tumorojn de la retino. Atentindaj estas jam la utiligoj de la lasero sed ankaŭ pli mirindaj estas la estontaj ebligoj de tiu moderna ilo.



Tio estas la « koro » de ruben-lasero, stangeto el sinteza rubeno ĉirkaŭita de spirala tub-lampo. La lamp-lumo ekscitas la ruben-atomojn. Tiuj lastaj « sorbas » la lumon kaj ĝin ellasas, naskantaj koheran lumon.

APUD GRESILLON

LA RUĜA TERALTAĴO

Ĉu zoologia ĝardeno estas besto-paradizo ? Specialisto asertas, ke sovaĝa besto bone zorgata povas okaze bedaŭri, ke ĝi ne plu estas malliberala. Jen anekdoto de li raportita. Lun dimanĉon, el la ĉirkaŭbaritejo de la vulpoj, trijara vulpino sukcesis forkuri tra malbone fermita pordo, kaj atingi kamparon, precize dum la ĉas-periodo. La posedanto kredis, ke li neniam revidos la fuĝintinon ; sed la sekvantan ĵaŭdon, nokte, li aŭdis karakterizan jelpetadon. Li ellitiĝis, aliris al la loko de kie venis la blekoj, kaj sur vojeto, inter densaj arbetoj prilumitaj nur de la lun-radioj, li vidis sian tremantan vulpinon, kiu rampis al li, kaj sendefinde atendis. Nur sufiĉis al li preni la beston en siajn brakojn kaj kunporti ĝin al la vulpa familio. Tio pruvas, la rakontanto aldonas, ke estus tute senutile liberigi beston, kiu kutime vivas inter la homoj. Ĝi ne estus akceptita de siaj samspecanoj vivantaj en plena naturo. Ĉiuj havas rezervitan ĉasteritorion, kie ili tute ne volas toleri enrudiganton, kaj besto liberigita konservas sur si homan odoron, kiun la sovaĝaj ne povas akcepti. De ĉie kaj de ĉiuj la nov-alveninto estos forpelita kaj plej ofte mortigita. La rakontanto havas multon por diri tiuteme. Li sciigis al ni strangajn : du geursidoj, frato kaj fratino, povas, plenkreskiĝintaj, pariĝi por la tuta vivo, sed, ĉar ili havas la saman patron, ili naskos malmultan idaron.

Kiu estas tiu viro, tiel bone scianta pri bestoj ? Eble vi konas lin se, okaze de restado en Grésillon, vi vizitis lian zoologian ĝardenon en « Le Tertre Rouge » (La Ruĝa Teraltaĵo) aŭ vidis la filmon pri ĝi farita. Lia nomo estas Jacques Bouillaud. Sur propra senkultura tereno, inter pinarbetoj, li kreis privatan zoologian ĝardenon, veran modelon, ĉar tie la mastro rolas pli kiel amiko de la bestoj ol kiel bredisto. Lia establiĝo estas larĝe malfermita al la publiko. Kiam oni vizitas ĝin oni malkovras novaĵojn, ĉu pri la bestoj, ĉu pri la aranĝoj de la lokoj, ĉiam ege puraj kaj konvenaj. Fakte ankoraŭ pli ol aparta nutrado,

varmigado propra al ĉiu speco estas necesa. Vintraj, en subteraĵo, hejtita kaj ventolita, 22° postulas por si Diale kaj Nigrita, la du ĉimpanzoj el ekvatora Afriko. Komforto kiu ne multe efikas sur la bonhumoro de la viro, tre kolerema ĉiufoje kiam vizaĝo aŭ vestoj de vizitanto ne plaĉas ol li. Temperaturo de 28° ĝis 30° estas necesa en la loĝejo de la saŭroj. Jen tuta sortimento de serpentoj, boaoj, pitonoj el kiuj unu estas kvar metrojn longa. Vizitantoj ĉiam miras antaŭ tiuj serpentoj dormantaj kaj volviĝintaj ĉar ili estas nokt-bestoj kaj disvolvigas sin prefere, kiam noktas. Ili agas ekzakte kiel ili agas en libero. Al pitono oni ĵetas vivantan predon. Brr... Kelkajn paŝojn plu, kaj jen varano, kajmanoj kaj krokodiloj sternantaj apud sia kuvego : Jacques Bouillaud ne timas enirigi sian brakon en la buŝegon de aligato.


Ni nun vidas du belajn ursojn el Himalajo, sed ilia ursido, Tintin estas nevidebla, protektata de sia patrino ĉe la fundo de la ursejo. « Ĉu estas alia novnaskito », ni demandas. Jes, inter aliaj, flava vulturo, tre rara specimeno naskita dum mallibero. Tamen, asertas nia gvidanto, kondiĉe ke oni bredu la bestojn en medio plej simila al la naskiĝ-loko, ke oni donu al ili konvenan nutradon, antaŭ ĉio ke oni sentigu al ili grandan sekurecon, ĉiuj kapablas naski dum mallibero... krom, eble, la sciuroj, la meloj kaj la marmotoj, kies taŭgajn kondiĉojn por generi ni ankoraŭ ne bone konas.

Sed vidu tiun belan sovaĝan katidon, tamen kruelan kaj perfideman felison ; ankaŭ kangurueton transportatan de la patrino en ŝia ventra poŝo, tuj de la naskiĝo, kiam ĝi estas dika nur kiel fazeolo. Ĝi vidigas sian kapon nur post kelkaj semajnoj, kiam ĝi povas riski la unuan salton. Estas horo de la tagmanĝo por la otarioj. Ili englutas ĉiujn merlangojn, kiujn oni ĵetas al ili.

Nun ni vizitu la tri gepardojn kuŝantajn en kaĝo el vitro, en atendo de la printempaj tagoj,

kiuj ebligos al ili eliradon en propran apudan ĝardeneton. La du linkoj aspektas treege pacemaj ma'graŭ sia reputacio. La panteroj estas malpli fidemaj. La tapiro alplatiĝas al la grundo, la aproj senmoviĝas ĉe nia alveno. La « reĝo de l'ĉezero-

ĝita por ili. Aliloke, jen la rabobirdoj, multaj aliaj bestoj, tuta regimento da papagoj riĉkoloraj kaj bruemaj. Ni ne vidos struton. Jacques Bouil-lault ne deziras havigi al si tian danĝeran beston, kiu povas, li diras, tratanĉi ventron de iu homo



to » roras por peti sian manĝon, tiam la hordo de ŝakaloj respondas per funebreca jelpado. Iliaj malbelaj blekoj terurigas la cervojn, cervinojn kaj damaojn, kiuj fuĝas en sian rifuĝejon. Jen agloj, kondoroj, akvo-birdoj kaj palmipedoj, cigno- kaj mevoj ĉirkaŭ granda baseno tauge aran-

per unu krur-bato. En Afriko ĉe amikoj, li vidis « Aglae », edukita struto, centkilogramojn peza, kiu, por defendi la kokejon de la mastroj ne timis lukti kontraŭ pantero, kaj mortigis ĝin en malpli ol tri minutoj.

B. CHEVERRY.



GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 350 jaroj mortis en Toledo
EL GRECO. Tiu hispana pentristo kaj skulptisto fakte naskiĝis en Kretio en 1541 kaj lia nomo estis Domenikos Theotokopoulos. Ankoraŭ tre juna li venis al Venecio, farigis lernanto de Ticiano kaj estis forte influita de la arto de Tintoreto kaj Mikaelangelo. Li vivis en Toledo de post 1577. El Greco estis genia katedral-pentristo kaj portretisto de la lasta periodo de manierismo. Lia arto ĉefe karakterizigas per longaj, maldikaj proporcioj per kiuj li celis al senmaterieco kaj spiritualizo de siaj artaĵoj.



Antaŭ 75 jaroj naskiĝis en Londono...

CHARLES CHAPLIN. La angla aktoro estis ankaŭ aŭtoro, reĝisoro, artisto kaj ĉefe komediisto. Jam en sia sepa jaro li ludis en Londona teatro. Li iris al Ameriko en 1910 kaj aperis sur ekranu la unuan fojon en 1914. En 1918 li fondis kino-societon. El liaj multaj filmoj kelkaj estas konsiderataj veraj majstroverkoj : « La kurego al oro », « La lumoj de la granda urbo », « La planklumo ».



Antaŭ 50 jaroj naskiĝis en Columbus (Usono)...

Tennessee **WILLIAMS.** La usona dramisto, kiu nun vivas en Nov-Orleano, ricevis sian unuan sukceson en 1944 kun la epopea teatraĵo « Menagerio el vitro ». La Pulitzer-premio estis al li atribuita en 1947 pro « Bedaŭroj, fina stacio ». Williams priskribas en siaj dialogoj la ekbatojn inter la esperoj kaj seniluziigoj de neplenumita vivo. La studo de la personoj estas trafa pro iliaj primitivaj aŭ flamiĝemaj karakteroj. Aliaj el liaj teatraĵoj estis filmitaj : « La kato sur varmega ferteĝmento », kaj « La tatuata rozo ».

Malhonestulo kaj poeto

François VILLON



Mistero ĉirkaŭvolvas grandan parton el la vivo de Villon. Lia naskiĝjaro estis 1431 aŭ 1432. La nomo Villon ne estis lia sed tiu de la kapelpastro, kiu zorgis pri lia infanaĝo. Je sia 20-a jaro li fariĝis magistro sed pli pensis pri amuziĝo ol pri studoj. Liaj kutimaj amikoj kaj frekventlokoj estis nerekomendindaj. La vivo de la tiamaĵ studentoj estis tumultega.

En 1455, Villon mortigis pastron kaj fuĝis el Parizo. Pardonita li revenis el Parizo sed, la sekvantan jaron, li partoprenis en ŝtelo kaj denove devis forkuri. Li vagabondis laŭlonge de la Loire sed estis malliberigita en 1461. Ludoviko la XI-a pardonis lin. Denove Villon vizitis malliberejon en Parizo en 1462. Liberigita li partoprenis en interbatiĝo kaj estis kondamnita je morto. La Parlamento nuligis la verdikton sed Villon estis ekziliita el Parizo. Kaj de tiu tempo oni ne plu scias ion ajn pri li. La malhonestulo malaperis.

Sed kio pri la poeto? Li ankoraŭ vivas per siaj verkoj, ofte ironiaj kaj ĉiam lirikaĵoj. Preskaŭ ĉiuj siaj poemoj montras bedaŭrojn pri pasinta junaĝo kaj timon pri la morto. Unu el la plej gravaj kaj famaj pecoj estas « La balado de la pendumitoj » kiun li verkis dum li atendis la pendumon. Jam nia granda poeto Kalocsay ĝin tradukis. Sed ni ricevis novan tradukon de nia amiko D-ro Tortel kaj kun granda plezuro prezentas ĝin al niaj legantoj.



LA BALADO DE LA PENDUMITOJ

*Homfratoj kiujn vivo daŭre ravas
Ne hardu kontraŭ nin tro viajn korojn
Kompaton al ni povraj se vi havas
Al vi pli frue sendos Di' favorojn
Vi vidas nin, kvin, ses, opajn fetorojn
La karno nia, plena de fisato,
Vorata, putris, jam de longa dato
Kaj ni, ostaro, iĝas cindro, polvo
Neniu moku pri la nia lato
Sed preĝu Dion por nia absolvo*

*Se, fratoj, nia plendo en vi klavas
Al ĝi ne surdu, estingu rankorojn
Justece ni de morto nun ja sklavas
Sed raraj sekvas ĉiujn virtrigorojn
Indulgu, ĉar travivis ni angorojn
Petegu Kriston por nia beato
Mildigu lin per via pietato
Li ŝirmu nin de la infera volvo
Ni mortis : haltu do ĉiu Pilato
Kaj preĝu Dion por nia absolvo*

*Kadavrojn niajn pluvo banas, lavas ;
Seknigraj ni eltenas sunfosorojn
Al ni l'okulojn ĉiaj birdoj kavas
Suferas barbo brovoj fiajn vorojn
Neniam sido mildigas dolorojn
Nin pelas tien ren blinda bato
De vento daŭra, kruda, sen kompto
Boratajn kiel fingringoj de korvo
Do fuĝu foren de nia sabato
Kaj preĝu Dion por nia absolvo.*

*Princo Jesuo, Diaŭtoritato
Elsavu nin el infera rilato
Al ĉiu nigra konto venu solvo
Ĉesu do ĉian spiton, ĉi homfrato
Kaj preĝu Dion por nia absolvo.*

FRANÇOIS VILLON.

(Traduko de D-ro J.-L. TORTEL).

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Bonvolu sendi viajn respondojn antaŭ la 31-an de Majo al : S-ro Pierre Chevalier, 19, boulevard Gabriel-Lauriol, Nantes (L.-A.), Francujo.

Unua problemo :

La fraŭloj el Bolonio


La enloĝantoj de la regno de Bolonio (kiun

vi ne povos trovi sur iu mapo) estas tiel patriotaj, ke ili geedziĝas nur en la ŝtato mem. Antaŭ ne longe popolkalkulado montris, ke 4,2 procentoj de la fraŭloj kaj 2,8 procentoj de la fraŭlinoj je la 1-a de Januaro geedziĝis dum la du monatoj kiuj, sekvis. Kiu tantiemo da Boloniano fraŭlaj je la 1-a de Januaro estis virseksaj ?

AMUZAJ PROBLEMOJ (de S-ro Jarlier)


Solve de la lasta problemo

Por ke restu nur du kvadratoj oni forigas la ok alumetojn kiuj troviĝas inter la ekstera kaj la interna kvadratoj.



Nova problemo


La ducifera nombro. — Trovu duciferan nombron tian, ke la sumo de la 2 ciferoj estu 7 kaj, ke, se oni renversas la ordon de la du ciferoj, la nombro pliiĝu de 9.




GRAMATIKO PER BONHUMORO

« ... «igi» kun verbo signifas nek «igi -anta», nek «igi -ata» sed nur «igi -i», sekve ĝi povas tre bone esti uzata en ambaŭ sencoj. ... En tiuj okazoj, kie malkompreniĝo povos aperi, ni devas ĝin eviti per precizigo de nia frazo mem. Ekzemple ni ne povas diri «sciigi amikon novajon», sed ni povas diri «sciigi amikon pri novaĵo», aŭ «sciigi novaĵon al amiko»; ambaŭ frazoj estas tute regulaj. »


(L.L. Zamenhof; Lingvaj Respondoj).



— Tio memorigas ion al mi: ĉu ni havas alternan aŭ kontinuan kurenton?



— Ĉu li faras tion por sciigi nin pri baldaŭa enlitiĝo?



— Tiu ludo ne tiom kurigas nin, kiom teniso

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).
Belĝujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (50 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).
Ceĥoslovakio : S-ro Valentin Kibalčí, TICHY POTOK, p. Brezonica n/T.
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).
Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).
Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).
Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).
Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).
 Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBLJANA, Poŝfako 239 (900 d.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).
Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).
Svedujo : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö, Postgiro : 157007 (6 kr.).
Svilando : Provizore vakas (Sendu viajn abonojn al la franca adreso).
Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).
Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centri-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo